

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang

★ LA PONTO ★

Nr. 11 November 1953

OFICIALA REVUO DE LA GERMANA ESPERANTO-ASOCIO
KAJ DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Ĉu nia movado vere stagnas?

De W. Wittbrodt, Berlin

La demando montras, ke la demando ne estas kontenta pri la nuna stato de la disvastigo de la mondlingvo. Jes, Esperanto naskiĝis antaŭ 66 jaroj. Ĝi jam estas grizhara. Ĝiaj anoj kaj amikoj kompreneble atendas, ke ĉi tiu bonstatura estaĵo estu konata en la tuta mondo. 66-jara homo, kiun la mondo ĝis tiu ĉi aĝo ne konas, ne povas atendi, ke li ankoraŭ fariĝu granda eminentulo, li jam estas kaduka. Nu, Esperanto ne estas mortemulo. Ĝi estas alia estaĵo, estaĵo de alia karno kaj sango. Por ĝi 66 jaroj estas kiel unu tago, kiu hieraŭ pasis, kaj kiel unu nokto, kiu ĵus preteriris. Ĉu la kristaneco 66 jarojn post sia apero estis konata en la tuta mondo? Ĉu la mahometanismo en tiu ĉi aĝo havis multajn anojn en la mondo? Ni ne forgesu, ke Esperanto travivis la du grandajn mondmilitojn kaj iliajn sekvojn. Ĝi tradaŭris la persekutojn dum la naciista tempo en Germanujo kaj tradaŭros la nunan indiferentecon de diversaj modernaj ŝtatoj. Ankaŭ por Esperanto validas la elparolo de Gamaŭlielo en la Biblio. Demandite pri la estonteco de la kristanaro, li diris: „Se la afero venas el homoj, ĝi pereos; se ĝi venas el Dio, vi ne povas subpremi ĝin.“ La sankta amo, kiun predikas Kristo, kaj la interna ideo, kiun adoras Zamenhof, donas al si la manojn. Mi memorigas pri la eldiro de Kant: „Du aĵoj min kortuŝas ĉiam denove: la stelita ĉielo super mi kaj la morala leĝo en mi.“ Per la morala leĝo, la sankta kunula amo, per ĉi tiu naturleĝo la kristaneco tradaŭros la jarmilionojn, kaj la „interna ideo“ de la mondlingvo, ankaŭ sankta kunula amo, la interkompreniĝo de la tuta homaro, garantias la ekzistadon kaj disvastigon de Esperanto. La mondo povas ekzisti nur laŭ eternaj ĉiam konstantaj naturleĝoj. Konstruu vian domon, vian ponton kontraŭ la leĝo de la pezoforto, kaj viaj konstruaĵoj staros sur sablo, ili disfalos. La planedoj marŝas siajn eternajn vojojn laŭ la leĝoj de la gravitado. Haltigu vian rapidveturantan aŭtomobilon tute subite, kaj vi flugos

kun via kapo tra la fenestran vitron, ĉu vi volas aŭ ne. Regas la leĝo de la inerteco, de la substanco. Ĉu tiu ĉi naturleĝo validas nur por la materio? Mi kredas ke ne. Ĝi validas ankaŭ por la spirita vivo. La granda kvanto de la homaro estas konservativa, estas inerta, restadas ĉe la ĉiutaga uzo. „Homo estas kutimema besto“, diras germana proverbo. Oni ne atendu progresojn el la amaso. Progreson efikas nur malmultaj kleraj individuoj. Ni ja konas la iamajn batalojn de la urboparlamentoj kontraŭ la konstruo de la unuaj fervojoj. Je miloj da ekzemploj oni povas montri, ke progresema estas nur la individuo, neniam la amaso. La amaso volas esti puŝata, devas esti pelata antaŭen. Tial la forto de la propagando. Leginte milfoje la saman frazon, la homoj kredas ĝin. Tial la multekosta propagando antaŭ la balotado por la parlamentoj. La balotado ne devas pensi pri la agado de la delegito dum lia pasinta funkcio, sed nur kredi je ĉiam ripetataj promesoj. Oni studu la interesan verkon de la franca kuracisto Gustav le Bon: „La psikologio de la amaso“, kaj oni komprenas, ke la amaso estas alia estaĵo ol la individuo. La amaso reagas tute alie kontraŭ eksteraj influoj ol la individuo.

Kio sekvas el tiu ĉi ekkono por la propagando de Esperanto? Oni aŭdas, vidas kaj legas tro malofte pri Esperanto. Tial, unue: Ni serĉu redaktorojn de grandaj gazetoj, kiuj estas pretaj raportoj en siaj gazetoj kiel eble plej ofte pri nia lingvo. Po-

vas esti mallongaj artikoloj, raportoj, sciigoj, sed ili devas aperi ofte. Mi scias, ke estos tre malfacile trovi ilin. Por raportoj pri boksbataloj kaj luk-tadoj la redaktoraj moŝtoj ĉiam havas sufiĉe da spaco, sed por Esperanto? Por la interna ideo? Por interkompreniĝo de la popoloj? Ŝajnas ofte, ke estas pli facile, eble ankaŭ pli agrable kaj dezirinde, malpacigi la homojn anstataŭ ilin pacigi. Do, se ni volas progresi, ni bezonas la amikecon de la redaktoroj de kelkaj grandaj gazetoj de la ĉiutaga vivo.

Due: Ni devas prizorgi, ke la kinetoj montru filmojn en la semajnaj raportoj pri la vivo en Esperantujo. Ankaŭ ĉi tie oni vidas boksbatalantojn, sporton kaj ree sporton. Ĉu vi jam vidis raportojn pri la grandaj jarkunvenoj de UEA, raportojn pri landaj Esperantistaj kunvenoj, pri Esperantaj ekspozicioj? Mi ne. Montri filmon, kiu nur propagandas Esperanton, estas laŭ mia opinio tute ne eble. La kostoj estus tro altaj, kaj ĝi estus montrata ja nur dum kelkaj tagoj. En la ofta ripetado kuŝas la efiko.

Trie: La samon ni devas postuli de la radiostacioj. Mi scias, ke ekzistas jam diversaj stacioj, kiuj elsendas raportojn ĉu en naciaj lingvoj, ĉu en Esperanto mem. Mi urĝe petas niajn anojn en la tuta mondo: Skribu kiel eble plej ofte dankleterojn al la sendastacioj, kiuj jam uzas Esperanton, sed skribu ankaŭ al la aliaj stacioj, kiuj ĝis nun ne uzas Esperanton, kun la peto aŭ eĉ postulo uzi ĝin. La stacioj devas esti superŝutataj de kartoj kaj leteroj el Esperantujo. Ĉiam ni pripensu, ke ni estas pioniroj de granda mondpliboniga agado.

Kvare: Ni prizorgu, ke la jam nun aperantaj Esperanto-gazetoj estu videblaj kaj haveblaj en ĉiuj publikaj bibliotekoj. Samideanoj, leginte viajn Esperanto-gazetojn, donacu ilin al iu biblioteko de via vilaĝo aŭ urbo, ne konservu ilin en viaj ŝrankoj, ĉar tie ili estas mortintaj. Nia devizo estu: La amaso de la homoj legu, vidu kaj aŭdu kiel eble plej ofte la vorton Esperanto!

Fondaĵo Montevideo

La prezidanto de UEA alvokas ĉiujn esperantistojn kontribui al ĉi tiu fondaĵo. UEA decidis sendi kompetentan observanton al la Generala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Por modesta reprezentigo estas necesaj proks. 5000 gmk. Sendu vian kontribuon al la Centra Oficejo de UEA kun mencio „Por Fondaĵo Montevideo“, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Angla-franca dulingveco en Eŭropo

Naciisma utopio

De D-ro Wilhelm Herrmann, Prezidanto de GEA

(La germana teksto aperis en EP n-ro 10/1953, paĝo 109)

La propono postulas, ke lernu la angloj la francan, la francoj la anglan, kaj la aliaj eŭropanoj la anglan kaj la francan lingvojn. En ĉi tiu kazo — kondiĉe ke la propono estas realigebla — interkompreniĝo inter ĉiuj eŭropanoj estus ebla.

Do la esprimo „dulingveco“ fakte estas erarigo. Vere la propono alcelas dulingvecon nur inter la angloj kaj la francoj. Al ĉiuj aliaj eŭropanoj la propono signifus trilingvecon. Oni ja devas kalkuli la gepatran lingvon de ĉiu alia eŭropano. La proponintoj laŭŝajne nombras nur la kiel oficiale deklarotajn lingvojn, ĉar la aliaj laŭ ilia espero ne plu estus gravaj por la eŭropa komunumo.

La propono ne konkordas kun egalrajteco. Laŭ demokrata principo samaj rajtoj postulas samajn deojn. Sed kia estus la situacio?

La angloj kaj la francoj devus lerni nur unu fremdan lingvon, sed la aliaj eŭropanoj du. Por bone scipovi fremdan lingvon nacian, laŭŝajne vizito al mezlernejo ne sufiĉas. Oni bezonas krome restadon en la koncerna lando. Do, tiuj eŭropanoj, kies gepatroj parolas nek la anglan nek la francan lingvojn, havus duoblaĵajn penojn kaj kostojn. Jam nun estas antaŭvideble, ke tiuj en konkuro pro ofico en eŭropaj administracioj kontraŭe al la angloj kaj francoj havus pli malmulte da ŝancoj pro manko da lingvo-perfekteco¹⁾. Krom tio la tempon, kiun la unuj bezonus por lerni la duan lingvon, la aliaj povus uzi por akiri specialajn sciojn. Per tio iliaj vivoŝancoj pliegiĝus; ĉar post enkonduko de la angla-franca du-(parolu: tri-)lingveco en Anglujo kaj Francujo el la lernoplano de la mezlernejoj malaperus la studado de la aliaj ne plu necesaj lingvoj. Ĉu tio estas intencata?


La propono ignoras la popollerneĵajn lernantojn! En popollernejoj, en kiu estas edukata la granda amaso, oni povus instrui nur la komencajn elementojn de fremda nacia lingvo. La instruado devus finiĝi per scipovo de kvara- aŭ tria-klasano, kiuj sufiĉas eĉ ne al legado, ne parolante pri konversacio. Tia instruado estas senvalora laŭ praktika vidpunkto. Ĝi penindas nek la tempon nek la kostojn. Oni devus ŝteli al la lernantoj aliajn instru-fakojn, kiuj estas ege bezonaj por la praktika vivo, sen kompensi tion per instruado de fremda lingvo. Sed se en popollernejoj oni instruu fremdan nacian lingvon, la praktika celo devas stari antaŭe; ĉar temas pri lingva interkompreniĝo kaj ne nur pri kleriga valoro de la lingvo-studado. Kiu kuraĝas enkonduki en la popollernejojn la lernadon de du fremdaj lingvoj, tiu vere fariĝus priridinda. Tio do signifas, ke la dulingveco

angla-franca estos nur privilegio de klerigitoj. Al la aliaj ne estus eble senti sin kiel eŭropanoj. Ĉu ĉi tio estas akordebla kun la koncepto pri moderna demokratio?

La propono estas utopia! Ĝi tute ne konsideras tempon, penojn kaj kostojn kaj la spertojn, kiujn oni akiris instruante fremdajn lingvojn. Laŭ la propono tri kvaronoj de la eŭropanoj devos lerni du fremdajn lingvojn spite la neceson, tuj post studado perfektigi la lingvan scipovon per restado en eksterlando — kaj kiu povas permesi tion al si? —, alikaze la akirita lingvo-scipovo restos torso, kiu iom post iom diserigos. Tio ĉi estas ĝenerala sperto. Ĝi validas ankaŭ por akademiuloj, se tiuj ĉi ne profesie okupiĝas pri fremdaj lingvoj kiel ekz. la filologoj. Se tio ne estus fakto, la nombro de la neangloj kaj nefrancoj, kiuj jam hodiaŭ scipovas la anglan kaj la francan lingvojn, estus milionoj; ĉar tiuj ĉi lingvoj jam ĉiam en la mezlernejoj de Eŭropo estis kaj estas devigaj fakoj. Laŭ tio la lingvo-problemo ne rajtus ekzisti. Ĝia ekzisto tamen pruvas, ke la lerneja instruado en fremdaj lingvoj ne kondukas al la dezirata celo. Pro tio sinceraj instruistoj kutimas ne akcenti la praktikan valoron de lingvo-instruado, sed nur ties valoron kiel klerigilo; ĉar ili estas konsciaj pri la limoj, kiuj estas metitaj al la instruado de fremdaj lingvoj per la naturo de l'objekto. Kio do ŝanĝiĝus estonte, ankaŭ se oni akceptus la proponon? Ankaŭ post dek jaroj la situacio ne estus pli bona ol nun.

Al la evoluo de dulingveco — trilingveco ekzistas praktike nenie — en la tuta Eŭropo mankas la premisoj. Ĝi ekzistas nur tie, kie diversaj popoloj intermikse loĝadas, do en limaj teritorioj, ekz. en Belgujo, Nordirlando, Alsacio, Supera Silezio, Sudtirolo ktp. Tie ekzistas ĉiam la okazo kaj devigo al uzado de du lingvoj. En ceteraj teritorioj dulingveco ne povas evolui, pro tio ke la lernejo sola — kaj tute ne la popollernejo — kapablas ĝisfunde peradi la scipovon de fremda lingvo nacia krom la gepatra lingvo.

Pro tio la propono ankaŭ enhavas multe da kontraŭdiroj! Ĝi estas dokumento de malsincereco kaj naciisma egoismo. Unue oni postulas komunan lingvon, poste oni parolas pri komuna helplingvo, kaj fine oni rekomendas la aprobon de du lingvoj, al kiuj ja mankas tiuj kvalitoj, kiuj estas nepre necesaj por komuna helplingvo. La angla kaj la franca lingvoj estas kaj restas naciaj lingvoj. Neniu el ili rajtas postuli por si mem la epiteton „komuna“ en Eŭropo, — ĝuste tial ne, ĉar ambaŭ rajtas konkuri inter si. Ili ne estas helplingvoj, ĉar por la destinata ĝenerala uzado ili estas tro malfacile lerneblaj, por ke ankaŭ la normala civitano povu uzi ilin krom sia gepatra lingvo.



La katedralo de Strasburgo la ekkonito de la urbo, en kiu la Eŭropa Konsilantaro pridiskutadas la estontan Eŭropon

La propono celanta la enkondukon de angla-franca du-(tri-)lingveco do ne promesas solvon de la eŭropa lingvo-problemo. Malantaŭ ĝi nur estas kaŝitaj naciaj celoj, kiuj kontraŭas al la intereso de la eŭropaj nacioj. Tion ĉiu scias, kiu nur iomete konas la faktojn. La proponita du-(tri-)lingveco povus evolui nur meze de laŭnombro malgranda kaj ekskluziva superklaso. En tiu ĉi la angloj kaj la francoj havus privilegion tute ne rajtigitan. Tion oni verŝajne alcelas!

39-a Universala Kongreso

Ĝi okazos 1954 en Haarlem (Nederlando), de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto. La adreso de LKK estas: poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando. Peranto por pagoj el Germanujo estas GEA (kasisto s-ano P. H. Klein, (22c) Essen, Demrathkamp 28. Kongreskotizoj (laŭvice por kongresano, por edz[in]o de kongresano kaj por junul[in]o ne pli ol 20-jara) ĝis 31-12-1953: guld. 19,00 - 9,50 - 6,50, ĝis 31-3-1954: guld. 22,00 - 11,00 - 7,50, post 31-3-1954: guld. 25,00 - 12,50 - 8,50. Individuaj membroj de UEA pagas guld. 2,50 malpli (edzo/edzino guld. 1,25).

Vojaĝo al Grésillon

Inter Kristnasko kaj Novjaro GEJ aranĝos en kunlaboro kun la franca junularo Esperantista renkontiĝon en Grésillon, la Kulturdomo de la franca Esperantistaro. Okazos referaĵoj de eminentaj Esperantistoj, ekskursoj al la antikvaj Loire-kasteloj kaj al monto St. Michel, du-taga restado en Parizo kaj tie urbgvidado kun la junulargrupoj de Parizo. Ĉiuj gejunuloj germanaj ricevos gravan financon subtenon el miedoj de la Federacia junular-plano. Petu detalajn informojn ĉe la Centro de Germana Esperanto-Junularo, Herford, Sandbrede 37. Aldonu reafrankon.

¹⁾ La fakton, ke la oficistaro en la eŭropa administracio estas malproporecie kunmetita favore al la angloj kaj francoj, oni ĉiam ekskuzas asertante, ke la aliaj nacioj ne povas oferti personojn sufiĉe lingvo-spertajn.



La 38-a Universala en Zagreb

Brila manifestacio de nia lingvo sur la Balkano

(Fino)

Faka kunveno de TEĴA

La kunveno, kiun ĉeestis dek personoj el kvar landoj, reelektis la samajn estraranojn. S-ano Marinko Ĝivoje parolis pri la sukcesoj atingitaj en Jugoslavio, kie dum la lastaj kelkaj monatoj aperis pli ol 400 artikoloj pri Esperanto, kaj la loka tagjurnalo „Narodni list“ aperigas ĉiutage 1-paĝan kongresan aldono en Esperanto kaj nacilingve.

Kunveno de KELI

S-ro D. de Boer el Hago prezidis la kunvenon kaj menciis, ke en 1954 okazos KELI-konferenco de la 25-a de julio ĝis la 31-a de julio ie en Nederlando. Novaj statuto kaj regularo estis pritraktataj. Oficiala evangelia Esperanto-kantareto aperos en 1954.

Post la kongreso okazos la nunjara KELI-konferenco en Rüdlingen, Svislando.

Kultura prelego: La jugoslavia literaturo

En sia unuhora prelego s-ano Ivo Rotkviĉ per brila stilo donis flugan trarigardon pri la evoluo de la literaturo de la jugoslaviaj popoloj tra la jarcentoj ĝis la hodiaŭa tempo. Treege malfacila tasko estas, en unuhora prelego prezenti kelkjarcentan literaturhistorion de kelkaj popoloj, kroatoj, serboj kaj slovenoj, sed tiun taskon s-ano Rotkviĉ solvis vere brile. Li prezentis karakterizajn trajtojn de ĉiu literaturhistoria epoko kaj la specialajn trajtojn de ĉiu el la sudslavaj naciaj literaturoj.

La aŭskultantaro samtempe ricevis koncizan sed klaran bildon pri la multjarcenta luktado de niaj popoloj kontraŭ la atakoj kaj influoj de iliaj ĉiufankaj najbaroj.

Vespero de jugoslavia muziko

La dua festa aranĝo estis la muzika vespero en la Zagreba foirejo. Ĝi konsistis el du partoj. En la unua parto kantis la gea kantista ĥoro de Radio Zagreb. Multnombra Esperantista publiko plenigis ĝis la lasta loko la grandan salonegon de la Zagreba foirejo. Precipe granda aplaŭdo estis post la kantoj kantitaj en perfekta Esperanto.

En la dua parto de la programo muzikis la sinfonia orkestro de la Zagreba foirejo. Precipe granda tis fragmentojn el kroataj operoj kaj el la baletoj „Oĥrida legendo“ de la serba komponisto S. Hristiĉ. Ĉiuj ari-solistoj kantis bonege kaj estis regalataj per aplaŭdego. Ĉiuj ĉeestantoj forlasis la muzikan vesperon pli ol kontentaj.

Vizito al la fabriko „Rade Konĉar“

Grupo da esperantistoj el Svedujo, Francujo, Aŭstrujo, Germanujo, Danujo kaj Nederlando vizitis la fabrikon de elektraj maŝinoj kaj aparatoj „Rade Konĉar“ (kie ekzistas E-grupo), montrante grandan intereson por laboro kaj vivo de laboristoj.

Publika kunveno de la Akademio de Esperanto

29-an de julio. Ĝi vekis inter la kongresanojn grandan intereson. La salono estis plenplena kaj multaj ĉeestantoj devis stari.

La prezidanto de la Akademio, s-ro Isbrucker, esprimis sian ĝojon pri la granda intereso por ĝi.

La diskutoj pri la prezentitaj temoj estis tre viglaj. Sinsekve estis pritraktataj la prononco de la vokaloj en Esperanto, la „tiom-kiom-malsano“, la landnoma finiĝo kaj la supersignitaj literoj.

Konklude oni povas diri, ke la eksperimento de publika kunveno de la Akademio, unuafaje provita en la Zagreba Kongreso, tre bone sukcesis.

Belartaj konkursoj

La amikoj de la belartoj havis okazon ĝui dum du horoj plej elstarajn verkojn, kiujn la ĵuga komisiono sesmembra elektis el la 96 konkursaĵoj senditaj el 16 landoj. Fortepiana ludo enkondukis la solenajon, dum kiu ni povis aŭskulti kelkajn el la premiitaj verkoj. La konkurso por deklamado finis la arangon kiun ornamis ankoraŭ fortepiana ludado.

La branĉo arto grafika kaj plastika ne trovis sufiĉan partoprenon. Tial oni transportos la ricevitaĵojn verkojn al la venonta jaro kaj reanoncos la konkurson.

Oratora konkurso

Antaŭ multnombra aŭskultantaro okazis konkurso de junaj oratoroj malpli ol 25 jaroj pri la temo „La rolo de Esperanto en la internacia proksimigo de la junularo“. Bedaŭrinde partoprenis nur tri junuloj, al kiuj la ĵuga komisiono proksimume samaltnivelaj prezentaĵoj nur en posta kunsido disdonis la premiojn jene: 1-e Nicola Minnaja, Italujo, 2-e Bruno Graf, Svisujo, 3-e Ludoviko Szekeres, Jugoslavio.

Horeto de poezio

„Ne estas prelego pri »poezio«, diris la iniciatinto, s-ano Stuttard, „la poetoj mem parolu kun minimumo da komento“. Sub tio devizo li prezentis kun helpo de s-anoj Lapenna kaj Svetliĉiĉ, s-anoj Rossetti kaj Francis antaŭ elita publiko serion da poemoj kiujn li elektis ne laŭ gusto de la publiko, sed laŭ sia

propra. La „Kvaropo“: Aŭld, Dinwoodie, Francis kaj Rossetti rikoltis tondran aplaŭdon nepre merititan. La vere intima atmosfero de la kunveno ebligis plenan ĝuon de tiuj lerte elektitaj perloj de nia poezio, kaj kun s-ano Stuttard ni esperas, ke la horeto de poezio trovi en estontaj kongresoj pli da intereso kaj iam plivastigu al festivalo de Esperanta Kulturo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: Vizito de la pedagogia muzeo kaj pedagogia instituto

La eksterlandaj instruistoj vizitis merkredon antaŭtagmeze la pedagogian muzeon.

Poste oni vizitis la pedagogian instituton. Prof. Muziĉ mallonge prelegis pri la lerneja sistemo en Jugoslavio kaj poste la estro de la Instituto Prof. D-ro Pregrad respondis al diversaj demandoj de eksterlandaj instruistoj pri la solvo de diversaj lernejoj kaj pedagogiaj problemoj en Jugoslavio. Post tio oni rigardis la bibliotekon kaj aliajn ejojn de la instituto.

Konferenco de sindikatanoj Esperantistaj

Merkredon la 29-an de julio 1953 kunvenis sindikatanoj esperantistaj el sep landoj kaj pritraktis la eblecojn de pli grandskala uzo de Esperanto inter sindikatoj.

Analizante la situacion de la laborista Esperanto-movado, la konferenco konstatis, ke en la sindikata movado Esperanto ne estas sufiĉe disvastigita kaj aplikata, kvankam ĝuste tiu kampo prezentas la plej firman bazon por unueca laboro. Post ĉiufanka pritrakto de ĉiuj eblecoj, pli disvastigi Esperanton inter sindikatanoj, sindikataj organizoj kaj laboristaj kolektivoj en unuopaj entreprenoj, la konferenco akceptis jenajn

REKOMENDOJN:

1. Laboristaj kultur-klerigaj societoj, sindikataj lernejoj kaj aliaj similaj klerigaj institucioj en laborista movado enprogramigu en siaj laborplanoj paroladojn pri internacia lingvo kaj ankaŭ lernadon de Esperanto, por tiel ebligi kiel eble plej baldaŭan larĝan kontaktigon de laboristoj diverslandaj.
2. En sindikataj organizoj oni elektu apartan funkciulon, kiu per korespondado, interŝanĝo de informoj, gazetoj kaj reciproka gastigado zorgu por internacia kontakto.
3. La konferenco proponas akcepti la alvokon de Sveda Laborista Esperanto-Asocio, partopreni la

konkursojn en lernado de Esperanto laŭ koresponda kurso aperiĝota en naciaj laboristaj gazetoj.

- La supraj decidoj estu komunikataj al ĉiuj ekzistantaj esperantistaj organizaĵoj: kaj precipe al la laboristaj, invitante ilin al kunlaboro.
- Por la plenumo de supraj decidoj estas elektita provizora sindikata kontakta komitato esperantista. Prezidanto: Vokoun Franjo, I. Stara Peŝčenica 50, Zagreb, Jugoslavio.

Vespero de popoldancoj

okazis en la granda salono de la kongresejo kun tre riĉa programo, konsistanta el multaj dancoj el Kroatio, Serbujo kaj Vojvodinio. La dancistoj apartenis al la folkloro sekcio de kulturarta societo „Vladimir Nazor“. La salonego ne estis sufiĉe granda por akcepti la multnombrajn Esperantistojn, kiuj montris apartan intereson por tiu ĉi arango kaj regalis ilin per entuziasma aplaŭdo.

Esperanto kaj Sociologio

Reprezentantoj el ses diversaj landoj pritraktis sub prezido de d-ro Solzbacher la temojn koncernantajn tiun komisionon. Por la vasta laborotero la nombro de la kunlaborantoj-specialistoj esperantistaj estas tro malgranda. Koncerne la enkondukan esploron pri socia konsisto de la Esperanto-movado, entreprenita de la komisiona sekretario s-ro Keur, oni laŭde menciis la modelajn kontribuojn de la landaj asocioj Argentino, Novzelandano, Svislando kaj Kroatio. La rezultoj jam nun estas tre utilaj.

Ekskurso al Samobor

Post la 4-taga laciga kongresa laboro jaŭdo la 30a de Julio estis ekskurso tago. La kongresanoj ekskursis en tri diversaj direktoj: al Samobor, Plitvice kaj Kumrovec. Plitvice-lagojn vizitis per 5 aŭtobusoj 220 kongresanoj. La aŭtobusoj havis la nomojn de Esperanto-pioniroj. Unu grupo, konsistanta el 45 kongresanoj, vizitis Kumrovec, la naskiĝlokon de Marŝalo Tito. La aliaj — ĉirkaŭ mil kongresanoj — vizitis la urbeton Samobor en la proksimeco de la kongresa urbo.

Samobor, kun ornamenta stacidomo kaj ĉefa placo, kie staris bonveniga triumf-arko, bonvenigis la gastojn. Ilin salutis Esperantlingve de sur la komunumdoma balkono la urbestro s-ro Vugrinec kaj alparolis la loka esperantisto Josip Magić.

Poste folkloraj grupoj el sep vilaĝoj el la Samobora distrikto montris revuon de naciaj dancoj. Krom la kongresanoj partoprenis multaj Samoboranoj. Post tio sekvis tagmanĝo. La gastiga entrepreno „Lavica“ (Leonino) kaj la komunumo prizorgis diversajn specialaĵojn. La marcipanistoj en pluraj budoj vendadis siajn specialaĵojn. La tuta arango estis popola kermeso. Multaj kongresanoj vizitis la muzeon kaj pluraj surgrimpis la malnovan Samoboran kastelon.

Vespere je la 18a horo la plej multaj revenis al Zagreb, aliaj restis ĝis pli malfruaj trajnoj.

Dua Ĝenerala Kunveno de UEA

Vendredon, la 31an de Julio 1953, salutis sub prezido de s-ro Malmgren ankoraŭ kelkaj organizaĵoj kaj individuaj Esperantistoj. Sekvis la raportoj de la sekcioj, fakaj asocioj kaj similaj.

Post dankesprimoj al la raportintoj, s-ro Malmgren petis d-ron Privat diri kelkajn vortojn pri la evoluo de la kongresoj.

D-ro Privat, komparante la pli fruajn kongresojn kun la lastatempaj, ĝoje konstatis, ke la nunaj kongresoj fariĝis pli pacaj, ĉar oni ne plu parolas en ili pri organizaj demandoj. Tion ni ŝuldas al niaj nunaj gvidantoj, precipe al nia nuna Prezidanto s-ro Malmgren. Ni devas elekti junajn homojn en la komitatojn, sed estas bone, ke restu ankaŭ kelkaj saĝaj pliaĝuloj. Koncerne la Zagreban Kongreson, ni aŭdis voĉojn, ke ĝi estis mirinda: ja nur per Esperanto ni havis la eblecon ekkoni tiun ĉi landon kaj popolon pli intime. Interparolante kun neesperantistoj d-ro Privat aŭdis voĉojn de admiro por nia Universala Kongreso, sed ankaŭ kritikojn montrantaj ke la esperantistaro al eksteruloj kelkfoje impresas kiel sekto. Estas konsilinde, ke la jarkunvenoj de niaj asocioj ni anoncu prefere kiel teknikajn konferencojn en Esperanto, anstataŭ kiel kongresojn de esperantistoj. Ni lernu esti maturaj homoj. Ni havas trezoron, kaj estas nia intereso sed eĉ nia deo al la homaro elmontri tiun ĉi trezoron.

Pri la rilato de UNESKO al nia afero la parolanto diris, ke ni atendu ne tro favoran decidon de ĝia konferenco en Montevideo. Li varme alvokis, doni faktojn al nia Centro de Dokumentado kaj samtempe al la registaro. Nia afero estas jam tiel ampleksa, ke ni devas pli efike organizi la informadon pri ĝi. La Prezidanto kore dankinte d-ron Privat, fermis la kunvenon per la lasta frazo el salutletero de d-ro Ivo Lapenna al la kongreso: „Insiste kaj senkompromise antaŭen!“

Naturamika Kunveno

Pri granda intereso por turismo en Britujo raportis la prezidanto s-ro Parker, kaj s-ro Finkenzeller el Vieno komunikis rezultojn de la sukcesa laboro, kiun faras la Esperantistaj Naturamikoj en Aŭstrio. Grava fakto estas la plua eldonado de naturamika revuo.

Kultura prelego pri la jugoslavia arto estis farata en tre interesa maniero de prof. Josip Vrančić.

Kunveno de la Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj

proponis, ke oni propagandu en naciaj societoj por ebligi la eldonon de pli bona ĵurnalo. Fine oni gratulis kaj dankis al la desegninto de la kongresa Esperanto-poŝtmarko, s-ro Matković, kiu ĉeestis la kunvenon.

Kunveno de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio

okazis en la biblioteko de la Kroatia Kuracista Domo; ĝin partoprenis 18 medicinistoj el 5 landoj. La plej gravaj decidoj de la kunveno estas

jenaj: La asocio ŝangas sian nomon al: Tutmonda Esperantista Medicina Asocio. La jarkotizo por la membroj de T.E.M.A. estas 1 usona dolaro aŭ egalvaloro. Oni decidis aperi en la gazetaro apartan alvokon al la esperantistoj-medicinistoj. Prezidanto estas prof. D-ro G. Canuto el Italujo.

Indonezia Kulturo

La indonezia s-anino Dateo Toemenggoeng prezentis aspektojn de la indonezia kulturo. Per indigenaj instrumentoj kaj diskoj ŝi demonstris la popolan muzikon: en la popola kulturo ludas gravan rolon la pupeteatro. La prezento de pupetoj estas akompanata de parolaj priskriboj kaj flankaj muziko. S-ino Toemenggoeng priskribis la simbolismon de la virinaj vestoj, skarpoj, sarongoj k. s., montrante vestojn por la felico, por ĵaluzaj virinoj kaj aliaj. Ekzemplojn de popola skulpt- kaj pentro-arto la kongresanoj povis proksime rigardi post la parolado.

Pacifista Kunveno

La prezidanto, s-ro Tucker, parolis koncize pri la situacio en pluraj landoj, kie la pacifistoj estas en malliberejoj. Sekvis pluraj demandoj por plua informo. Poste kelkaj ĉeestantoj parolis pri siaj landoj. Ĉe la instigo aperiĝis pacifistaj informoj en la Esperanta gazetaro oni unuanime decidis, „postuli substrekon de tiu peto en la oficiala raporto de la kunveno kaj inviti ĉiun ĉeestanton skribi al la redaktoro de sia Esperanto-ĵurnalo por peti la regulan aperon de almenaŭ duonpaĝo da novaĵoj pri la pac-movado“. Ĉeestis proks. 50 personoj.

Universala Ligo

Antaŭ proks. 150 aŭskultantoj la sekretariino komunikas informojn el la Centra Oficejo, i. a. ke fine de aŭgusto en kongreso de la Mondmovado por Mondfederacio UL estos reprezentata de s-ino Isbrucker kaj prof. Lapenna. Post tio la prezidanto, prof. Privat, parolis pri la temo „Ĉu Eŭropano, ĉu Homarano?“ Li diris, ke Eŭropa Federacio povos esti utila por mondfederacio, sed li asertis, ke estas pli facile vekti aman senton al la tuta homaro ol krei kontinentan senton por unu kontinento kiu fakte ne ekzistas. Por la mondfederacio li postulas konsilantaron de personoj kaj ne de ŝtatoj. Vigla diskutado sekvis la paroladon.

Kongresa Balo

Sur la bele ornamenta teraso de hotelo „Esplanade“ la kongresanoj amase kolektiĝis en naciaj kostumoj aŭ festaj vestoj por ĝui agrablan vesperon ĉe dancado kaj frandado. La bonega orkestro ludis tre plaĉe sed kun iom tre longaj paŭzoj kaj tro frua fino. La portantoj de naciaj kostumoj havis apartajn dancojn kaj rikoltis entuziasman aplaŭdon de la ĉirkaŭstarantoj. Iom tro malgranda estis la danc-areo por la multaj gedancemuloj. Longe post fino de la muzikado ankoraŭ kunsidis la gesamideanoj por profundigi la amikecajn interrilatojn ekkreskintajn dum tiu ĉi kongreso.

(Finon vidu sur pĝ. 136)

Oficiala Parto de Germana Esperanto-Asocio

Oficejo: Köln-Dellbrück, Bergisch-Gladbacher Straße 1095 / Sekretario: Richard Reuchlin, Mannheim-Feudenheim, Körnerstraße 30
Redaktanto: Mathias Schumacher, Köln-Weidenpesch, Fehrbellinstraße 5

Esperanto-Ligo Berlin (ELB)

En la septembra liga monatkunveno gejunuloj partoprenintaj en la internacia junularkongreso en Wörgl, Aŭstrujo, vigle kaj entuziasme rakontis pri kelkaj tieaj travivaĵoj.

La monatkunveno ankaŭ arde diskutadis pri la demando „Kiam okazu la kongreso de GEA?“ La plimulto de la ĉeestantaro opiniis, ke Pentekosto estas la ĝusta tempo, ĉefe pro la regulaj du festotagoj kaj la ferioj, kiuj ebligas al multaj esperantistoj la partoprenon, kaj, ne malpli, pro la religie simbola valoro de tiu festo, kiu bone ligiĝas kun la ideo de mondlingva movado.

En la grupkunveno de Charlottenburg la 18-9-53 s-anino Frieda Boettcher faris interesan paroladon pri la germana verkisto Hermann Stehr, decidante la plejan parton de ĝi ne al la verko, sed al la homo. Precipe ŝi ĉerpis el la fonto de personaj travivaĵoj, kaj tiel la aŭskultantoj aŭdis multon, pri kio ili alie ne estus ekscintaj ion.

La septembra ekskurso de la berlinaj esperantistoj al la Botanika Gardeno kunigis plenkreskulojn kaj junulojn, kiuj malgraŭ la aŭtuna vetero deziris esti en la libera naturo.

Kunveno de REVELO-delegitoj en ESSEN

Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo okazigis la 20-9-53 kunvenon de delegitoj en Essen-Hügel, bele situanta en ĉarma pejzaĝo apud Baldeney-lago. La vetero ne estis favora, sed oni havis okazon posttagmeze viziti elstaran artekspozicion en la famkonata vilao Hügel.

La proksimume 45 ĉeestantoj reprezentis preskaŭ ĉiujn REVELO-grupojn. El la raporto de la prezidanto, s-ano Hübner, montriĝis, ke entute la stato estas kontentiga. La ligo konsistas nun el 35 grupoj kun 550 membroj.

Komence de la oficiala kunsido, aliĝe al konciza raporto pri la germana Esperanto-kongreso en Frankfurt je Pentekosto 1953, s-ano Hübner kiel administranto de GEA raportis pri la laboroj ĝis nun faritaj kaj la malfacilaĵoj jam venkitaj por starigi la GEA-oficejon en Köln-Dellbrück. Parolis ankaŭ s-ano Wings en la GEA-kongreso en Frankfurt kaj respondis al demandoj koncerne la aferon Epstein. S-ano Klein kiel prezidanto de la Esperanto-Unuiĝo Essen, la invitita grupo, salutis la kunvenon kaj aldonis pluajn informojn pri Frankfurt.

Oni decidis finfine efektiviĝi la planon faritan en Hagen: kolekti ekspoziciematerialon por REVELO. S-ano Dey, Solingen, transprenos la kolektadon kaj ordigon de la libroj, presaĵoj ktp. Oni adresu al s-ro Dey, Solingen, Schule Stöcken.

Detale oni preparolis la intencojn, krei Esperanto-Instituton por Rejnlando kaj Vestfalia, por atingi subvenciojn de la kultministerio.

Posttagmeze s-anino D-rino Chr. Spruch kaj s-ano Hanings, ambaŭ el Krefeld, tre interese kaj boninforme rakontis — ŝi pri „Esperanto-kultursemajno“ en la franca Esperanto-kastelo Grésillon, li pri „Esperanto-semajno“ en Frostavallen, Svedujo. Post ili s-ano Klein, Essen, referadis pri varbmetodoj. Ĉiuj tri rikoltis merititan aplaudon.

Printempe 1954 okazos la venonta delegitara kunveno, kaj en aŭtuno sekvos la REVELO-tago; la lokoj estas fiksotaj. B. K.

GEA-kongreso 1954 en Marburg

En la estrara konferenco la 26-an kaj 27-an de septembro en Köln oni decidis okazigi la venontjaran ĉefkunvenon de GEA en Marburg (Lahn) je Pentekosto. Detalaj informoj sekvos.

Krom ĉiuj estraranoj partoprenis la konferencon ankaŭ la prezidanto kaj lia anstataŭanto de Germana Esperanto-Junularo, s-anoj Brinkmann kaj Ebmeier, kiuj ambaŭ povis doni ĝojigan raporton pri la laboro ĝis nun farita por Esperanto flanke de la germana junularorganizaĵo esperantista. Oni raportos pri tio en EP.

Sudokcidenta Esperanto-Ligo (SOELO):

La aŭtuna konferenco de la okcidenta kaj la norda distriktoj okazis la 20-9-53 en Worms. Ĉeestis gesamideanoj el 10 urboj kaj vilaĝoj de la distrikto.

Antaŭtagmeze raportis la grupaj reprezentantoj pri la laboro dum la pasintaj monatoj kaj pri la planoj por la venonta vintra sezono. Malgraŭ la somero la vivo verdstela estis sufiĉe vigla. Menciinda estas la kreskanta nombro da renkontiĝoj kun eksterlandaj gesamideanoj vizitantaj Germanujon aŭ traveturantaj al internacia kongreso. Tiaj kunvenoj ebligas sperti la praktikan valoron de Esperanto ankaŭ al gesamideanoj, kiuj ne povas vojaĝi eksterlanden.

La ĉeestanta prezidanto de GEA, s-ano d-ro Herrmann, detale raportis pri sia kampanjo kontraŭ la propono celanta enkonduki dulingvecon anglan-francan en Eŭropo. Intertempe la Konsilanta Asambleo de la Eŭropa Konsilantaro ne aprobis la proponon kaj prokrastis la decidon pri fonda de eŭropa lingvo-komunumo.

Posttagmeze estiĝis vigla diskutado pri la temoj „Kiamaniere plivigligi la

grupvivojn?“ kaj „Kiamaniere akiri la junularon?“ S-ano Nischwitz (Bensheim) informis la partoprenantaron pri siaj spertoj en kursoj kun gejunuloj. Li instigis aranĝi kursojn en la kadro de la diversaj junulgrupoj, ekz. ĉe la konfesiaj kaj sindikataj. S-ano Reuchlin (Mannheim) proponis la peradon de taŭgaj korespondamiko al la kursanoj kaj la prizorgon de la korespondado fare de la kursgvidantoj.

La konferenco fine estis komuna vizito al la vidindaĵoj de la historia urbo Worms. Koran dankon al la Wormsanoj pro ilia bona preparlaboro!

GEA gratulas . . .

al s-ano Horst Spirat kaj edzino en München, Attenkofferstr. 55, pro naskiĝo de filineto Angela Sigríd.

Ni funebras . . .

En julio de ĉi tiu jaro mortis nia malnova kaj fidela s-ano Otto Wörner, membro de la grupo Stuttgart, kelkajn tagojn antaŭ sia 80-a naskiĝtaga reveno. Li estis esperantisto jam antaŭ la unua mondmilito kaj vizitis multajn kongresojn.

Mit dem grünen Stern am Wagen . . .

... oder im Knopfloch braucht sich ein Esperantist nirgendwo in der Welt verlassen zu fühlen“, schreibt uns Frau Léonie Woelk. „Kaum im Freistaat Triest angekommen, in dessen internationalem Gewimmel wir etwas hilflos herumirrten, sprach uns bereits jemand in flüssigem Esperanto an: s-ano Matteo Brusi, der sich uns sofort als lebenswürdiger Gastgeber zur Verfügung stellte, uns seine schöne Stadt zeigte und uns bei allen Schwierigkeiten, vor allem bei dem dort üblichen Feilschen in den Geschäften, half. So erging es uns überall auf unserer langen Reise durch mehrere Länder Europas...“

Fürwahr, Esperanto ist nicht nur der Passepartout zu allen Ländern der Welt, es ist vor allem der Schlüssel, der die Herzen der Menschen öffnet. Von echter Hilfsbereitschaft und inniger Freundschaft unter allen Esperantisten der Welt hören und lesen wir immer wieder von Reisenden, die aus dem Ausland zurückkehren. Wir meinen, die Politiker, die sich tagein, tagaus kramphast um die Völkerverständigung bemühen und dabei doch kaum einen Schritt weiterkommen, diese Politiker sollten einmal ein klein wenig ihrer enormen Arbeitskraft der Förderung der



Frau Léonie Woelk, Düren, und Matteo Brusi, Triest

Esperanto-Bewegung widmen; sie könnten sich dadurch viel unnütze Kraftvergeudung ersparen und kämen schneller zum Ziel.

Internacia Esperanto-Junularkunveno en Büsum

Tiu ĉi kunveno havis specialan karakteron. Esperanto-junulkubo de malgranda loko invitis helpe de subvencioj de registaraj instancoj 16 junajn geamikiĝojn el 7 landoj (Norvegujo, Svedujo, Danujo, Britujo, Francujo, Italujo kaj Aŭstrujo). Multajn germanajn esperantistojn ĝi ne volis inviti por garantii kiel eble plej grandan kontakton inter la eksterlandanoj kaj la 32 Büsumanoj. — La popolaltlernejo kaj la banloka administracio helpis grandanime kaj malavare en la aranĝoj. La popolaltlernejo pagis ekskurson kaj organizis publikan festvesperon, kaj la banloka administracio pagis ĉiujn kostojn de festbalo kaj traktis la eksterlandajn gastojn kiel „honorgastojn“. Dum la kunvenaj tagoj flirtis ĉe la marbordo je honora loko la grandega flago kun la verda stelo kaj je ambaŭ flankoj la 8 flagoj de nacioj reprezentitaj. Je la honoro de la junaj esperantistoj la banloka orkestro ludis la Esperanto-himnon. Krome la gejunuloj estis dufoje gastoj ĉe vesperaranĝoj de la banloka administracio. — La urbestro kaj la direktoro de la banloka administracio aranĝis salutvesperon. La salutparoladon faris la urbestro, s-ro Grether, esperantlingve. — En la mateno antaŭ la ŝatpromenado aŭ la banado la gejunuloj laboris en la muzikĉambro

de la Supera Lernejo. Ili lernis komune multajn kantojn diverslandajn, kiujn ili poste kantis ĉe internaj festhoroj, ekskursoj kaj oficialaj aranĝoj, ankaŭ ĉe la radio-intervjuo. — Tre utila estis la komuna teatro-ludado (scenoj el „Gyges kaj lia ringo“ kaj „La rubeno“ de Hebbel, „Georgo Dandin“ de Molière kaj „La kuzo el Bremen“). Dum la festhoro por la aliaj junulkuboj de Büsum, kiuj apartenas al Kreisjugendring, junaj klubanoj ludis varbteatraĵojn en germana lingvo. — Estis organizitaj dufoje lumbildvesperoj, dufoje kafovesperoj, krome du ekskursoj, unu al arbara regiono kun prahistoriaj tomboj kaj al la kanalo de Kiel, la alia al Hamburg. La ĉeftravivaĵo estis la Internacia Kultura Vespero, kiu tute sukcesis kaj fariĝis vera travivaĵo. — La dankleteroj de la eksterlandaj gejunuloj substrekis la harmonion de la kunveno kaj ĝian kulturalan valoron. Gazetoj kaj radio raportis tre favore pri la kunveno. La intervjuistoj konfesis, ke ili malofte havis tiel ĝojigan intervjuan taskon kiel kun la junaj esperantistoj. — La meritplena organizinto de la junularkunveno en Büsum, s-ano Richard Pfütze, instruisto en la Supera Lernejo, demandas: „Kiu daŭrigos venontjare la inviton de eksterlandaj gejunuloj?“



Sinjo en Konstanz

Sinjos Sprung über die Grenzpfähle

Wer kennt sie nicht, die fünfzehnjährige blonde Sinjo aus Ravensburg? Siglind Erika Schmalzriedt, das deutsche „Esperanto-Mädchen“, hat trotz ihrer Jugend schon viele Länder Europas besucht. Über diese Reisen, die ihr nur durch die Kenntnis der Esperantosprache und mit Unterstützung der Esperantofreunde in den betreffenden Ländern möglich waren, hat sie nun ein 200 Seiten umfassendes Buch veröffentlicht, das im Veitsburg-Verlag, Ravensburg (Württemberg), erschienen ist und 6,50 DM kostet. Presse und Rundfunk in Deutschland haben in den letzten Wochen lebhaft über Sinjo berichtet und sie als die jüngste Buchautorin der Bundesrepublik bezeichnet. Der Titel des Buches lautet „Sinjos Sprung über die Grenzpfähle“.

EL LA GRUPOJ

Bingen kaj Heidelberg en somero akceptis multajn eksterlandajn gesamideanojn, kiuj plej parte en karavanoj vizitis Germanujon aŭ traveturis al la kongreso en Zagreb. Arango de komunaj kunvenoj, vizitoj al urbaj vidindaĵoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵojn.

Frankfurt. Kurso por komencantoj en la loĝejo de la grupestrino f-ino E. Jacobs. Estas preparata fondo de esperantista junulkubo.

Frankfurt/M. La societo regule eldonas monatan informilon kun la programo kaj interesaj lingvaj konsilioj neaperantaj en vortaroj. En septembro okazis amuza vespero nomita „Gaja Esperantio“. Krom la grupvespero okazas daŭra lingva studrondo por progresintoj.

Hamburg. La detala programo de la Hamburga Esperanto-Societo regule aperas en la monata informilo. En septembro la societanoj ekskursis al la Saksa Arbaro. Cefa arango en oktobro estis publika prelego de s-ano d-ro Wegener el Essen pri medicina temo. En la grupvesperoj raportis membroj de la societo pri siaj vojaĝoj en eksterlando. Fremdenverkehrsverein Hamburg, Hamburg 1, Pavillon am Hauptbahnhof eldonis novan esperantlingvan prospekton kun multaj buntaj desegnaĵoj.

Herne. Kurso por progresintoj en la Sindikata Domo. En somero la grupanoj ekskursis en la ĉirkaŭaĵojn.

Köln. La 1-an de okt. okazis varbarango, post kiu komenciĝis nova kurso por komencantoj.

München. Anoncoj pri la aranĝoj de la Esperanto-grupo „Laboro“ regule kaj senpage aperas en la loka gazeto. En la grupvesperoj gesamideanoj rakontis tri siaj vojaĝoj al eksterlando kaj partoprenoj en internaciaj kongresoj. En komerca lernejo Riemenschmidt kaj en la Sindikata Domo okazas entute tri kursoj por komencantoj kaj du por progresintoj.

Neustadt a. d. W.: En Majo junaj grupanoj estis gastoj de la Asocio de Eŭropaj Junuloj kaj diskutis pri la temo „Ĉu ni bezonas Esperanton?“ Pri la kunveno, en kiu estas forigitaj multaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, la loka ĵurnalo „Rheinpfalz“ favore raportis. — En la sama ĵurnalo la grupo ekkomencis diskutadon pri Esperanto. Estas publicitaj multaj favoraj kaj malfavoraj respondoj el la tuta regiono. Kelkaj legantoj de „Rheinpfalz“ eĉ opiniis, ke oni superigu la francan lingvon kiel oficialan lingvon de la Eŭropa Defend-Uniigo. — Grupanoj vizitis la ĉi-jarajn internaciajn Esperanto-kongresojn kaj kvin junaj membroj kiel gastoj de la Asocio de Eŭro-

